

Christian Winther,
Ripozo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Foras la suno, la tago for-
plonĝas,
staras la nuboj jen ĉe l' ĉiel-
rand',
lumas la steloj; dormetas kaj
sonĝas
en trankvilego la mar' kaj la
land'.

Aĥ, se mi povus, nun kiam fi-
niĝos
mia viv-tago, - samkiel jen flor'
-
turni kun fido, ĝis ree tagiĝos,
min al la juna matena aŭror'!

*Traduko de la Dana poemo
"Hvile" de CHRISTIAN WIN-
THER (Kristiano Vintero,
*1796 - †1876) en Esperanton
de MANFREDO RATISLAVO
(Manfred Retzlaff, Stettiner Str.
16, D-59302 Oelde, Germanio,
1938-11-04) en 1984-10.04.

MR-158-3 / Arg-244-494 (2004-
06-10 11:11:55)

Christian Winther,
Hvile

Solen er slukket, dagen forstum-
mer,
skyerne stå ved himlens rand,
stjernerne smile; drømme og
slummer
favne i stilhed hav og land.

Ak, når min dag nu snart er til
ende,
kunne jeg da, som blomsten der,
hulle mit hoved blødt og mig
vende
trygt mod det unge mor-
genskær!

*Verkinto de tiu ĉi Dana poemo
estas CHRISTIAN WINTHER (Kri-
stiano Vintero, *1796 - †1876).*

Arg-244-493 (2004-06-10
11:09:37)

Christian Winther,
Sun' estingiĝis

tradukita de Hans Erik Jensen

Sun' estingiĝis, tag' denove
mortis,
Nuboj leviĝis, nokton al ni
portis,
steloj ridetas milde sur ĉielo
tra la malhelo.

Ho, kiam venos al mi la tagfi-
no,
do mi ĝin benos pie per kap-
klino.
Fine mi dormos pace kiel floro
ĝis la aŭroro!

*Traduko de la Dana poemo "Hvi-
le" de CHRISTIAN WINTHER
(Kristiano Vintero, *1796 -
†1876) en Esperanton de HANS
ERIK JENSEN (†1973-06-18).*

Arg-244-923 (2008-09-14
00:00:04)

*La kanto-teksto estas libere
tradukita de la dana esperantisto
Hans Erik Jensen. La traduko
troviĝas en la kant-libreto "Kan-
tu", eldonita de H. E Jensen kaj
Harald Grønberg, sur la paĝo 18,
kanto n-ro 17. Ĝi estas kantebla
laŭ melodio de Hakon Andersen
(laŭ indiko notita super la teksto
en la kantlibreto.) Pri Hans Erik
Jensen vidu ankaŭ la retejon:
[http://www.esperantonia.
dk/bio-hej.htm](http://www.esperantonia.dk/bio-hej.htm).*